

# LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Gvidas redakcia konsilantaro. — Redakcio: Plzeň, Houskova ul. 32. — Administranto: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

I. GROSS:

## MALGOJA DATREVENO.

Malĝojan datrevenon ni rememorigas al ni en tiu ĉi monato. Antaŭ kvin jaroj en aprilo anoncis gazetaro morton de eminentulo, de geniulo, aŭtoro de lingvo internacia »Esperanto«, Dro L. L. Zamenhof.

Ni, esperantistoj, tiam eĉ ne volis kredi tiun doloran kaj malĝojan fakton. La 14an de aprilo 1917 forlasis niajn vicojn tiu nobla homo, ne ĝisvivinte la finon de terura mondmilito, kiu certe kaŭzis al li multe da kordoloro. Lia vivo estis negaja, sed ĝi estis fruktodona. Senĉese kaj senprofigite li laboris sur kampo de lingvo internacia — li laboris senlace por bono de homaro. Kaj li laboris dum multaj jaroj, oferinte sian junecon, sian tutan vivon kaj trankvilecon, ne por sia gloro, sed pro amo al ĉiuj homoj.

Jam en sia junaĝo li ekkonis, ke unu el ĉefaj baroj inter popoloj estas nekompreneblo — diverseco de lingvoj. Kaj li decidigis forigi tiun baron. Li kaptis tiun ideon en urbo Bjelostoko (en Polujo), kie li naskiĝis la 15an de decembro 1859.

Diversaj nacioj, loĝantaj en tiu urbo, vivis malamike inter si. Tion vidis juna Zamenhof kaj nur pro amo al homaro li penis forigi tiun ĉi malbonon. Laboro estis tre malfacila, des pli malfacila, ke li laboris tute sen helpo de aliaj. Ofte li pensis, ke »tiu laboro ne estas laŭ homaj fortoj«, sed tamen li ree kaj ree revenadis al sia amata revo ne povinte ĝin forlasi. Feliĉe, li brile sukcesis finverki plej bonan lingvon internacian.

Li kredis, ke per lingvo internacia, apartenanta al neniun nacion, li forigos unu el la plej gravaj kaŭzoj de malamikeco inter popoloj.

Lingvo internacia estis lia plej grava problemo, per kiu li okupadis sin senĉese. Kaj lia laboro ne estis vana. Dum nemultaj jaroj esperanto disvastiĝis en ĉiujn civilizitajn landojn de la tuta mondo. Plej bona pruvo pri taŭgeco de Esperanto.

Dro Zamenhof donis al ni plej bonan ekzemplon de frateco kaj amikeco. Li montris al ni tiun belan vojon, kiu kondukas al frateco inter popoloj. Kie estas hodiaŭ paroloj de tiuj malamikoj de Esperanto, kiuj proklamadis, ke ĝi ekzistas nur dum vivo de sia aŭtoro, ke ni propagandos ĝin nur dum vivo de Zamenhof, kaj ĝis ni perdos nian gvidanton, ke ni certe forlasos Esperanton. Ho ne, vi malamikoj de Esperanto, Ni amis arde nian karan majstron, lia perdo estis por ni tre dolora, sed li postlasis al ni kreaĵon, al kiu li donis firman fundamenton, kreaĵon, kiu estas kapabla vivi, kiu estas kapabla alporti utilon, feliĉigi homaron. Tie en varsovia tombejo kuŝas dormon eternan korpo de tiu bona homo, kiun devis ami ĉiu, kiu linkonis aŭ kiu konis lian vivon. Jes, tie en tombo estas restoj de tiu bona homo, kiu estis al ni tiel kara, kiu donacis al ni verkon plej belan, verkon plej noblan. Lia korpo kuŝas tie en tero, sed lia spirito nin ne forlasis, ĝi vivas inter ni, ĝi fortigas nin por daŭrigi tiun noblan laboron, ĝi montras al ni vojon de amo inter homaro. Niaj pensoj flugos en nunaj tagoj al tombo de nia kara majstro kaj kun li ni vokos entuziasme: »Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la interna ideo de la esperatismo, vivu la frateco de la popoloj, vivu ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj, vivu, kresku kaj floru nia verda standardo!«

L. L. ZAMENHOF:

## MIA PENSO.

## I.

Sur la kampo, for de l' mondo,  
antaŭ nokto de somero  
amikino en la rondo  
kantas kanton pri l' espero.  
Kaj pri vivo detruita  
ŝi rakontas kompatante —  
mia vundo rerapita  
min doloras resangante.

## II.

»Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,  
kial tia senmoveco?  
Ha, kredeble rememoro  
el la kara infaneco?«  
Kion diri? Ne ploranta  
povis esti parolado  
kun fraŭlino ripozanta  
post somera promenado!

## III.

Mia penso kaj turmento,  
kaj doloroj kaj espero!  
Kiom de mi en silento  
al vi iris jam oferoj!  
Kion havis mi plej karan —  
la junecon — mi ploranta  
metis mem sur la altaron  
de la devo ordonanta!

## IV.

Fajron sentas mi interne,  
vivi ankaŭ mi deziras, —  
io pelas min eterne,  
se mi al gajuloj iras...  
se ne plaĉas al la sorto  
mia peno kaj laboro —  
venu tuj al mi la morto,  
en espero — sen doloro!

L. L. ZAMENHOF:

\* \* \*

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj — se Esperanto vivos — ĉu oni tiam povos aknoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute nenia diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la reguleco de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniam diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo. Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj

estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn — tia lingvo ne bezonas jam timi, ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas. La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti.

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan relon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj tiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: »kiu pli laŭte krias, tiu estas prava«. Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj mal-

pacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas miajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj »espero, obstino kaj pacienco«; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: »konkordo«.

(Kraków 1912.)

ooo

ALOIS JIRÁSEK:

## MALJUNAJ ARBOJ.

Multaj homoj ŝatas elserĉadi antikvaĵojn en lando, en muzeoj, la citadelojn, kastelojn kaj aliajn historiajn memorindaĵojn. Mi tre ŝatas la maljunajn memorantojn — centjarajn arbojn. Mi vidas ilin plej ofte en solejoj, kie ili restis kaŝitaj al homa avaremo, aŭ kie konservis ilin estimo de simpla popolo; tiu estimo estas eble la restaĵo de sankta kulto, kiun esprimis al ili niaj prapatroj, kvazaŭ al loĝlokoj de potencaj ekzistaĵoj kaj spiritoj.

Kio logas min al ili? Ĉu estas tio senvola estimo al la alta aĝo, al la forto, kiu tiomfoje pli longe ol ni kontraŭstaras detruon kaj morton, al ni tiel baldaŭ destinata?

Ĉu estas tio penso pri ĉio, kion memoras tiu muta atestanto kun sia putriĝita korpo,



## FELIETONO

### BINDKRAVATO.

El serbo-kroata lingvo tradukis A. Ĉech.

»Kravatojn, kiujn vi portas, tute al mi ne plaĉas«, diris iun tagon mia edzino. »Mi ĝojas, ke vi sur mi ne trovas pli grandajn mankojn. Sed kion cetere faris al vi miaj kravatoj?« »Ili ne estas modernaj. Ĉiu pli bonstata sinjoro portas nun bindkravatojn.« »Mi ne apartenas al pli bonstataj sinjoroj. Mi ne havas tiom multe da tempo kiel ili, por ke mi staru tutajn horojn antaŭ spegulo kaj aranĝadu bindkravaton.«

»Mi petas vin, ne diru, ke vi ne havas tempon vestigi vin iom laŭ modo. Ĉu vi devas ĉiam esti tiel malzorge vestita kiel ia ajn artisto?«

»Mi ĝojas, ke mi almenaŭ iom similas al famaj viroj.«

»Do, vi ne volas porti bindkravatojn?«

»Ne!«

»Nu, bone!«

Edzino komencis obstini. Miajn demandojn ŝi respondis tiel koncize, kvazaŭ ŝiaj vortoj estus el oro.

sed kun la ĝis nun freŝa, densa foliaro, kiom da fulmotondroj, ventegoj, kiom da frostoj kaj neĝaj blovadoj ĝi travivis, kiom da generacioj dume vivis, ĝojis kaj suferis ĝis ĉio mortis?

Lacigita de la homoj kaj de laboro, mi ŝatas kaŝi min de tempo al tempo en la ombron de tiuj grandeguloj, kiuj al mi, forkuranta el la homa socio estas plej amataj kunuloj. Ili estas pasinteco, kaj ili tamen ankaŭ vivas.

Ili staru solece en vasta ebenaĵo, en juna arbetaro aŭ en malhela profundaĵo de vasta arbarego ĉiam ili impresas kaj impresis kompreneman animon.

Kiam la homo ne sciis konstrui kaj volbi kuraĝajn, grandiozajn kupolojn, li havis grandajn, ombrajn arkaĵojn de epokaĝaj arboj.

Poezio de maljunaj arbaretoj, ilia mistera krepusko kaj brueto influis potence je vigla animo de niaj prapatroj. Tie ili preĝis al dioj, kiuj parolis kun ili per mistera voĉo de branĉoj kaj ondoj de kie ekflamadis mistika magia lumo de orakolo, tie en la ombro de muskokovritaj memorantoj naskiĝis la mitoj eĉ heroaj kantoj.

Mi sidadis sub ili, mi, moderna formiko, por ke mi uzu iliajn trankvilecon kaj solecon; ilia parolo dum epokoj egala, ĉarma, ekzalta, kiu jam al kelkaj generacioj bruetis en la sonĝon kaj revon, kvietigas mian maltrankvilan, malkontentan penson.

Mi aŭskultas, mi rigardas la pejzaĝon aŭ trankvilan arbaron kaj mi pli libere spiras,

»Kio al vi okazis pro Dio?« mi fine demandis. »Vi tamen ne koleros je mi pro tiuj bindkravatoj! Per kolero vi malrektigas viajn belajn vangetojn, kredo, eĉ iomete tio al vi ne konvenas.«

»Ankaŭ al vi ne konvenas tiuj malnovaj kravatoj. — Kiel malgaje, se post dekokjara edzeco edzino ekkonas, ke viro ne edziĝis kun ŝi el amo.«

»Ke mi ne edziĝis kun vi el amo? Vi tamen eĉ ian dotajon ne havis. Jes, estas vero, mi ne edziĝis kun vi el amo — nur tiel pro amuzo.«

»Mi ne scias, kial vi kun mi edziĝis! . . . El amo certe ne! . . . Ho ve, se mi estus dekokjara kaj havus blondajn harojn, vi certe tuj plenumus mian deziron kaj aĉetus bindkravaton.«

Ŝi aludis tion, ke mi iam parolis pri mia amo al blondharulinoj.

»Trankviliĝu, kara edzino! Eĉ se tion dezirus plej aminda — plej ĉarma blondulino, mi ne plenumus ŝian deziron.«

»Jes, ĉar vi ne estas sufiĉe delikatsentema. Virino dum tuta jaro beligas sin nur por edzo, sed li eĉ iomete ne penas, por ke li akiru plaĉon ĉe edzino.«

forĝesante la malakordojn, vekigitaj de libroj kaj de ekkono de homoj. En mia animo vekigas la impresoj de juneco kiel eĥo de ĉarmaj, jam longe malaperintaj sonoj, kaj ŝajnas al mi, ke ĝi reĵuniĝas.

Sed tamen la animo sentas la doloron pro tio, ke ĉio jam malaperis, kaj ke ĝi ne havas jam tiun forton, por ankoraŭ unufoje tiel vigle kaj arde senti — kaj esti feliĉa.

Tradukis Božena Mráčková.

oooo

### TRI DEZIROJ.

Iamaj fraŭlinoj.

Foje iris iu knabino kaj renkontis maljunulon, kiu tre malsatis. Li petis ŝin je peceto da pano. La knabino donis al li tutan pantranĉaĵon. La maljunulo dankis kaj poste diris:

»Vi estas bonkora knabineto kaj tial mi volas vin iel rekompenci. Elektu al vi tri dezirojn kaj ĉiu el ili efektiviĝos.« La knabino diris: »Mi dezirus al mi, ke Johaĉjo amu min, ke la panjo resaniĝu kaj ke mi havu ĝis mia morto sufiĉe por manĝi.«

Nuntempaj fraŭlinoj.

Ree iris knabino kaj ree renkontis maljunulon, kiu tre malsatis. La knabino momenton pripensis, sed poste ŝi permesis al li, ke li formordu al si peceton da kremulaĵo, kiun ŝi ĵus portis de sukeraĵisto. La maljunulo dankis kaj diris al ŝi: »Elektu al vi tri dezirojn kaj la knabino tuj respondis:

»Ne estas ĉiam tiel! Virino ja beligas sin dum tuta jaro, sed ne ĉiam por edzo. Plej-grandparte pro tio, por ke ŝi veku envion de aliaj virinoj. Kaj dandoj de promenadoj — tiuj malplenaj marionetoj — beligas kaj ornamas sin nur pro tiuj virinoj, kiuj preferas larĝajn modmantelojn aŭ piedvestojn de amerikana fasono, antaŭ pli profunda animo en eluzita vesto.«

Virino ekridis. »Ne fieru nur tiom pri via interna valoro.«

»Mi ne estas fiera, sed mi malamas ĉion nenaturan. Mi malamas frizaranĝitan kapon, pudritajn vangojn, aranĝitan barbon, mi malamas ĉiun, kiu bonodoras kiel tualeta sapo, kaj fine mi malamas ankaŭ bindkravatojn. Mi ne scias, kial mi devus per aranĝado de tiuj malbenitaj bindkravatoj pasigi kvin minutoj, se mi por aranĝo de miaj malnovaj papilioformaj kravatoj bezonas nur kvin sekundojn. Kaj nun mi petas vin, elpeku tiujn bindkravatojn el via obstina kapeto.«

»Se vi min, karulo, nur iomete amas, vi devas porti bindkravatojn.«

»Mi ne amas vin. Mi vin neniam amis. Vi mem tion tamen diris. Mi edziĝis kun vi nur tial — ĉar mi enuis. Iun tagon mi havis ne-

»Mi deziras al mi, ke riĉega bienposedanto kiu havas propran aŭtomobilon amindumu min. Plue mi deziras al mi, ke mi el la tuta loĝantaro de Praha plej bone sciu danci »Shimmy« kaj fine mi volas ludi la ĉefrolojn en biografaj filmoj.«

El ĉeĥoslovaka lingvo tradukis Andĉla Zittová, Domažlice.

\* \* \*

Ne estas ĉiam plej granda malnoblulo tiu, kiu faris perforton fizikan, multe pli granda malnoblulo estas tiu, kiu fariĝis ĝia intelekta iniciatoro, sed estante malkuraĝegulo por ĝin mem plenumi, li kaŝas sin post persono alia.

oooo

### PRINCIPDEKLARO.

En la nuna periodo ni, Esperantistoj, devas ĉion konsideri el propaganda kaj instrua vidpunkto.

Tia estu nia kondutregulo, ĝis kiam la Registaroj oficiale akceptos Esperanton kaj ĝin oficiale enkondukos en la lernejojn.

Grava eraro estus opinii, ke pli facile, pli rapide tion ili faros, se ni unue konsentas pri kelkaj reformoj: Francio anst. Francujo, plena aŭ parta forigo de la akuzativo, neŝanĝebleco de la adjektivo, per anstataŭ de post pasivo k. t. p.

Uzante nian Zamenhofan lingvon, montrante al ĉiuj, eĉ al la skeptikuloj, ĝian plenan

nion gravan por fari — nu — kaj do mi edziĝis kun vi.«

Edzino ne respondis, sed ŝi komencis tuj min ataki. Mi ne amas familiajn malpacojn, mi malamas disputojn kaj kverelojn, sed nunfoje mi decidiĝis, ke mi ne cedos. Ne kaj ne! Ok tagojn ŝi superŝutis min per siaj malicaj kaj venenaj rimarkoj kiel per bomboj. Ok tagojn ŝi atakis min per koleraj malestimaj kaj malvarmaj rigardoj.

Sed mi estis kvazaŭ surdmuta. Mi nur ridetis kaj ridetis kiel »Mona Lisa« de Leonardo.

Subite edzino ŝanĝis taktikon. Ŝi kuiris plej malbonajn manĝaĵojn, kirujn mia delikatsentema stomako tute malamis. Ŝi volis min malsatigi kiel malamikan fortikaĵon. Sed mi superuzis ŝin. Antaŭ tagmanĝo mi ĉiam nerimarkite malaperis el domo kaj iris en plej proksiman restoracion, kie mi satmanĝis laŭ gusto. Sed edzino post nelonga tempo elspionis ĉion kaj ŝi komencis novan atakon. Ŝi tute mutiĝis. Unuaj tagoj estis por mi tre angoraj. Mi petas, se homo dum dek ok jaroj al kutimiĝis al edzino, kiu multe parolas — ne estas mirinde, ke ĉiu terurigiĝas vidante ŝin paŝadi tra ĉambro, kvazaŭ ŝi estus ia muta, vaksa figuro. Sed baldaŭ mi ankaŭ al tio ĉi al kutimiĝis. Ĉar ŝi nesukcesis, komenciĝis

taŭgecon en ĝia nuna formo, ni iros al la venko: sed, se ni mem kredigas, ke ĝi bezonas unue kelkajn »plibonigojn (!)«, ni detruos la konfidon kaj pereigos nian tutan aferon.

Ni do simple uzu nian Esperanton. Ni ne perdu nian tempon kaj nian forton, diskutante aŭ kritikante ĝin.

Esperato nin ĉiujn superas, kaj nia sola gloro estas modeste labori por ĝia estonta triumfo, kiun ni eble ne ĝisvivos, sed certigos, en necesa persona sinforgeso, nur per nia konkordo ĉirkaŭ komuna programo: Plena respekto al la lingvo, kiun donis al ni D-ro Zamenhof, por ke ni ĝin disvastigu senlace en la tutan mondon al pli alta celo!

Th. Cart, *Presidanto de la L. K.*

**Akademio.** Pro troa laborado, kiel redaktoro de grava gazeto pri senfadena telegrafio, kaj ankaŭ tre senkuragiĝita de la reformemo ĉe kelkaj, kiu sur ŝancebla fundamento, malebligis ĉian ĉirman konstruaĵon, Dro Pierre Corret rezignis en la Akademio la direktorecon de la sekcio por la scienca kaj teknika Vortaro. Ne forgesante la servojn de Dro Corret kaj dankante lin, la Akademio decidis unuvoĉe komisi al S-ro Rollet de l' Isle, kiu akceptis al taskon organizi kaj direkti, sub ĝia kontrolo, la laborojn de la supredirita sekcio. Kiel sekretario S-ro Rollet de l' Isle elektis S-ron C. Rousseau aŭtoron de la »Poliglota Vademecum de internacia Farmacio«. Ĉiujn dokumentojn oni do bonvolu de nun sendi al S-ro C. Rousseau, 4. Place de la République, Levallois-Perret (Seine), Francujo. — Th. Cart, *prezidanto.*

nova taktiko. — Larmoj! Ili fluis fonte kiel rivero Ŝava post pluvo. Kvar tagojn, tutajn kvar tagojn daŭris tiu ĉi malbona stato. En loĝejo estis jam tiel malseke, ke komencis kreski fungoj. Kaj larmoj senĉese fluis kaj edzino plorsingultis. »Neniam, neniam vi amis min!«

Se guto da akvo ŝtonon traboras — kion do larmoj el bela virina okulo? Mi moliĝis kiel butero je suno.

»Mi amis vin«, mi fine ekvokis, »mi amas vin kaj mi vin volas ami eterne. Iru kaj alportu al mi bindkravaton! — — — Alportu du bindkravatojn! — — — Alportu dekduon da bindkravatojn! — — — Dormu, miaj karaj papilioformaj kravatoj sur altaro de mia amo kaj forbrulu en kameno kiel ŝelo de nukso!«

Edzino ekkaptis min ĉirkaŭ la kolo, kaj ĝojekvokis: »Do vi tamen min amas!«

Posttagmeze mi jam havis bindkravatojn. Edzino montris al mi kiel oni aranĝas nodon. Al mi ŝajnis ĉio tiel simpla, sed kiam mi mem provis bindi novan kravaton, mi aspektis kiel pendiĝito, kiu forkuris de pendiĝilo, havante ankoraŭ ŝnuron sur kolo. Edzino riproĉis, ke mi estas mallertulo kaj al mi ŝajnis, ke mi pli facile povus pace vivi kun eŭropa politiko, sed kravaton aranĝi mi ne sciis. Tiuj monstraj

## XIV-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

EN HELSINKI — HELSINGFORS (FINNLANDO),  
LA 8.—16. DE AUGUSTO 1922.

### Triaj kaj kvara komunikoj.

**Vivkostoj en Helsinko.** La cifero I signifas unuarangan hotelon aŭ restoracion, II duaradan, III pensionon aŭ »hejmon por vojaĝantoj« (puraj kaj komfortaj), IV malkaran manĝejon (ankaŭ ĉi tiuj tre rekomendindaj). **Loĝejo:** I 35—70 mk (du litoj 50—100 mk), II 30—50 mk (du litoj 40—70 mk), III 25—35 mk (du litoj 35—50 mk). **Teo aŭ kafe kun buterpano** 5—6 mk. **Matenmanĝo** (lumĉo) I—III 12—15 mk, IV 5—9 mk. **Tagmanĝo** I 20—25 mk, II 15 mk, III 12 mk, IV 6—10 mk. **Vespermanĝo** same kiel tagmanĝo. **Vegetara** matena, taga aŭ vespera manĝo 7—9 mk. Pri malkaraj loĝejoj ni informos poste.

**Antaŭkongresa ekskurso** trans la **Polusa cirklo.** Ĉar kelkaj samideanoj el Italio esprimis la deziron viziti la bordojn de Glacia Oceano, ni decidis iniciati ekskurson al Petsamo, la nova teritorio de Finnlando ĉe la Glacia Oceano. Ĉi tiu vojaĝo kompreneble estas tre longa kaj parte peniga, tiel ni povas ĝin rekomendi nur al grandaj turistoj, sed cetere neniu ekskurso pli plene valoras la penojn. Ni aludas al la ilustrita artikolo en Esperanta Finnlando, decembro 1921. — La partoprenontoj devos elveturi el Kristiania, ĉefurbo de Norvegio, la 9an de julio: ili povos resti unu tagon en la interesaj urboj Trondhjem kaj Tromsø, kaj alvenos al Vardø la 16an nokte. Ĝis tie la vojaĝo okazas en unuaklasa vaporŝipo. De tie oni daŭrigas per motorboato al Petsamo, kie oni alvenos antaŭ la malleviĝo de suno, kiu okazas la unuan fojon en

bindkravatoj kaŭzis, ke mi fariĝis jam nerve-ma. Nenio helpis kaj edzino devis al mi bindkravatojn mem aranĝadi. Post nelonga tempo ŝi komencis ĝemeti: »Ho ve! Kia malbona sorto kun vi, eĉ bindkravaton vi ne scias bindi. — — — Cetere ŝajnas al mi, ke tiuj bindkravatoj al vi tute ne konvenas.«

»Ah ne — male«, mi diris. »Al mi ŝajnas, ke mi iel juniĝis. Antaŭ nelonge diris ju elegante vestita sinjorino al sia amikino en elektra tramveturilo: »Rigardu, kia aminda, ĉarma junulo.« Tio tamen ĝis nun neniam al mi okazis. Jes, bindkravato faras homon pli agrabla, pli bela — cetere ĉiu pli bonstata sinjoro portas nun bindkravaton!«

Kiam mi la duan tagon serĉis miajn bindkravatojn, mi ekkonis por mia granda plezuro, ke ili malaperis. Mi demandis do edzinon, kie ili estas. — »Mi donacis ilin al nia domservisto. Vi estis prava, ke vi tiam ne volis porti bindkravatojn. Portu nun denove viajn malmovajn papilioformajn kravatojn. Ili konvenas al vi multe, multe pli bele.«

Ŝtono defalis de mia koro. Fine mi liberigis min de tiuj malbenitaj bindkravatoj. Nun portas ilin nia domservisto. Lia edzino ĉiam kolere nin rigardas, ĉar ŝia edzo ĉiam ion renversos, kiam li al si aranĝas bindkravaton.

la somero la 17an de julio, certe ankaŭ tiam nur por kelkaj minutoj. La meznoktan sunon la ekskursantoj vidos almenaŭ trifoje. En Petsamo ili restados ekskursante kaj fiŝkaptante 7—10 tagojn, por poste ekveturi laŭ riveroj, lagoj, ŝoseo, per boatoj kaj poŝta aŭtobuso ĝis Rovaniemi, kie ili eniros fervojan kupeon. La 3an de aŭgusto ili alvenos en Helsinko, kie ili do havos du plenajn tagojn por ripozo kaj rigardado de la urbo, se ili ne volas uzi tiujn al ekskursoj. — La ekskursanoj, kiuj eble ne kuraĝas alveturi tra la dezertoj, laŭ riveroj kaj lagoj, povas reveturi laŭ la linio Vardö—Narvik—Haaparanta—Tornio—Helsinki, per vaporŝipo kaj vagonaro. — La kostoj de vivado en Petsamo estas ĉ. 50 Fmk tage. La veturo tra la dezertoj kostas 1,200—1,800 Fmk (laŭ nombro de partoprenantoj), de Petsamo ĝis Helsinki, kun manĝo, tranoktado kaj ĉio enkalkulata. La vojaĝo tra Narvik proksimume egale. Biletprezoj: fervoje Kristiania—Trondhjem I 134.—, II 67.—, III 39.30, ŝipe Trondhjem—Vardö I 117.50, II 75.—, III 47.50 Norvegaj kronoj.

**Donacoj entute 3000 Fmk.**

**Postkongresoj.** Ni ricevis definitivajn informojn pri sekvantaj postkongresoj: Stokholmo, la 15—16, de aŭg., Kopenhago la 18—19; de aŭg.

**Antaŭ la kongreso.** Responde al kelkaj demandoj ni informas, ke la LKK zorgos pri programo por vendredo kaj sabato antaŭ la kongreso por tiuj, kiuj alvenas vendrede en Ariadne (tra Stettin).

**Monsendo.** Ni ankoraŭ foje atentigas la aliĝantojn, ke ili ne uzu poŝtmandatojn sed pagu per papermono aŭ per bankaj ĉekoj. Kaj atentu, ne aĉetu ĉekon kun sumo notita en finnaj markoj sed en via nacia valuto, se vi ne volas kaŭzi perdon al vi kaj al la kongreso. Okazis jam, ke eksterlanda banko kalkulis je kurzo 15% pli malfavora ol la finnaj bankoj. Do, la ĉeko ne estu pagota en Helsinko sed en via landa ĉefurbo al la LKK. Ni jam zorgos pri ĝia plejprofita monigo. Ĉi tio koncernas same la kotizojn kiel la sumojn kantoj kaj deklamaĵoj.

**Aliĝoj.** La ĝisnunaj aliĝintoj estas el sekvantaj landoj: Germanio 23, Pollando 13, Estonio 12, Britlando kaj Holando po 10, Franclando 7, Ĉeĥoslovakio 6, Aŭstrio kaj Svislando po 3, Svedlando, Litovio kaj Hispanio po 1, Finnlando 49, **entute 139 aliĝintoj el 13 landoj.**

**Garantia kapitalo entute 11.100 Fmk.**

**La Loka Kongresa Komitato.**

Adreso: Poŝta (ankaŭ por mensendoj) XIV. Kongreso de Esperanto, Helsinko, Finnlando.

Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

## DIVERSAĴOJ

**Geneva konferenco,** kiu traktos pri enkonduko de Esperanto en lernejojn, okazos de la 18. ĝis 21. de aprilo 1922. Ĝi havas por ni eksterordinaran gravecon kaj estas necese, ke kiel eble plej multaj ŝtatoj estu en ĝi reprezentataj per siaj delegitoj. Ĉeĥoslovakio delegas s-on Dr. Stan. Kamaryt, profesoron en Bratislava.

**Donacoj por malsatantaj Rusoj.** Simile kiel en la 3a numero de «La Progreso», ankaŭ Ĉeĥoslovakia Asocio Esperantista instigas esperantistojn, ke ili helpu al malsatantaj Rusoj. Ĝis nun oni kolektis:

En kunvenoj de Esp. klubo en Plzeň . . . . . Kĉ 171.—  
Esperantista klubo en Praha . . . . . Kĉ 793.—  
Esperantista klubo »Zamenhof« en

Kladno donacis el klubo kaso . . . . . Kĉ 1000.—  
monkolekto aranĝita en klubo . . . . . 100.—

Entute Kĉ 2064.—

**II. Okcidentbohema regiona kunveno** okazos dimanĉe la 7an de majo 1922. Programo: Antaŭtagmeze je la 9a horo en laborista domo »Peklo« 1. raporto el I. Okcidentbohema regiona kunveno. 2. debato pri kunlaboro de ĉiuj esp. societoj de okcid. Bohemujo. 3. raporto pri »La Progreso«. 4. pri la Ĉeĥoslovaka kongreso esperantista en Brno. 5. parolado pri urbo Brno kaj ĉirkaŭaĵo. 6. pri »U. E. A.« 7. liberaj proponoj. — Posttagmeze: Vagado tra urbo Plzeň. Vespere je la 8a horo en laborista domo »Peklo« amuzvespero: muziko, kantoj kaj deklamaĵoj.

Por komitato de Okcident-bohemaj regionaj kunvenoj: Ing. R. Novák, Jos. Přibáň.

**La la Ĉeĥoslovaka kongreso esperantista** okazos en Brno la 10an kaj 11an de junio 1922. Samideanoj el tuta Ĉeĥoslovakio, zorgu jam de nun, por ke la I-a Ĉeĥoslovaka kongreso esperantista estu multnombre vizitota.

**Esperantista Centra Oficejo. Grava avizo.** La oficistaro de la Esp. Centra Oficejo konsistas nun el la solaj jenaj personoj, kiuj dediĉas tempon al la Oficejo, ekstere de siaj profesiaj okupoj: S-roj Gabriel Chavet, ĝenerala sekretario de la K. K. K.; Barono F. de Ménéil, ĉefadministranto, kaj Leono Agourtime (ĝenerala propagando); F-inoj G. Gérard kaj Ch. Gaillot (administrativaj laboroj). Por faciligi kaj rapidigi la laboron, oni bonvolu adresi ĉiujn sendaĵojn laŭ la jena maniero: **Esperantista Centra Oficejo, 51, Rue de Clichy, Paris-9e.** La mensendojn oni adresos al la persona nomo de S-ro F. de Ménéil, aŭ al lia poŝta ĉekkonto: Paris 1er Arrondissement C. C. 8-60.

**IIIa Internacia Specimena Foiro de Milano** okazos de la 12a ĝis la 27a de aprilo. Informojn kaj klarigojn oni petu ĉe la: Oficejo de la »Fiera Campionaria di Milano«.

**Fervojistoj ĉiulandaj!** La estraro de la Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (I. A. E. F.) intencas aranĝi fakan kunvenon dum la XIVa Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko. La tagordo estas tre grava. Ni nur citas: voĉdonado pri regularo; elekto de la estraro, ĉar la ĝisnuna akceptis siajn oficojn dum la XIIIa nur provizore por unu jaro; fervoja terminaro ktp. Sed la intenco restos nur intenco, se la kolegoj, precipe en la altvalutaj landoj, ne helpas. La vojaĝkostoj al kaj la restado en Helsinko estas multekostaj, precipe por ni estraranoj, loĝantaj en la malbonvalutaj landoj: Ĉeĥoslovakio kaj Germanujo. Nia asocia kaso, ĉar ankoraŭ juna, ne estas tiel riĉa por doni subvenciojn eĉ nur al unu estrarano. Do, kolegoj, se vi deziras, ke ni aranĝu fakan kunvenon, helpu al ni per mondonacoj. Ĉiu, eĉ malgranda sumo estas danke akceptata. Bonvolu sendi la monon letere al nia kasisto, fervoja revizoro Emanuel Kubásek, Plzeň, Lobežská ulice, Prov. domy skup. B-I-68, Ĉeĥoslovakio. La finnaj kolegoj kore estas petataj havigi al ni senpagan loĝejon en Helsinko. Sciigojn pri tio bonvolu sendi al la subskribita prezidanto. Proponojn por la tagordo akceptas la sekretario. — **Georg Habellock,** fervoja inspektoro, prezidanto, Breslão



10, Schleiermacherstr. No. 19, Germanujo. — **Josef Blažek**, fervoja inspektoro, sekretario, Olomouc, Nová 266, Ĉeĥoslovakio.

**Gvidfolio tra Internacia Banurbo Wiesbaden.** Urba oficejo de banurbo Wiesbaden eldonis esperantan, bele ilustritan gvidfolion tra urbo Wiesbaden. Ni atentigas ĉiujn esperantistojn, ke ili postulu ĉi tiun belan esperantaĵon, kiu estas senpage ricevebla ĉe »Urba oficejo por trafiko« (Städtisches Verkehrsbureau), banurbo Wiesbaden, Germanujo.

**Ŭjezd apud Deubravka.** Sekcio de »Laborista Ligo Esperantista« en Ŭjezd aranĝis sian regulan kunvenon la 19an de marto 1922 je la 10a horo matene en sia kursoĉambro. Post parolado de s-o Pešek, prezid., de ligo, oni elektis ĵenan komitaton: Václav Kočárek, prezidanto, Jaroslav Baněček, vicprezidanto, Václav Pedál, kasisto, Josef Kodl, sekretario. Nomita sekcio petas, ke ĉiuj leteroj estu adresataj al sekretario Josef Kodl, Ŭjezd 46, Ĉeĥoslovakio.

**En Dolní Lukavice** apud Přeštice estis fondita sekcio de »Labor. Ligo Esp.«, kiu havas 20 membrojn, kiuj elektis sekvantan komitaton: Vojtěch Hes, prezidanto, Josef Kraus, sekretario, Karel Bouzek, kasisto.

**Plzeň, sekcio la** en laborista domo »Peklo« aranĝas 2 kursojn de esp. en legejo »Dělnická Akademie«. Unu okazas marde, dua vendrede, ĉiam de 7a ĝis 8a horo vespere. Tiujn du kursojn vizitas entute 50 gelnantoj. Instruas k-do Pech.

**Plzeň-Letná.** K-do Rendl kaj Jukl gvidis du kursojn por laboristoj de mondkonata bierfarejo en Plzeň. Ilin vizitis 100 lernatoj. Kursoj estis antaŭ kelkaj tagoj finitaj. Lernantoj nune deziras korespondadi kun fremdlandanoj. Fremdlandaj esperantistoj, kiuj interesus intersanĝi korespondadojn kun bohemiaj progresemaj laboristoj, estas petataj, ke ili sendu sian adreson al k-do Rendl, prezidanto de »Laborista Asocio Esp.«, Plzeň-Letná, vilao Kukačka, Ĉeĥoslovakio.

**Laborista Asocio Esperantista (germana) en Plzeň.** Pro diversaj kaŭzoj oni aranĝis la 12an de marto 1922 eksterordinaran ĝeneralan kunvenon. En komitaton oni elektis: Simon Ernst, prezidanto, Brejcha Kurt, sekretario, Ebach Karoline, kasistino. Aliaj anoj de komitato estas: Schreiber Emil, Burda Rud. kaj Moos Georg. Estis akceptita sekvanta rezultato: 1. Aliĝi al la »Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio«, sidejo Plzeň. 2. Membra kotizajo por jaro 1922 estas 12 Kč. Nova komitato certe estas entuziasma por esp. idealo. Ĝi prenis sur sin tiun noblan taskon, konstante kaj diligente labori por nia lingvo. Pro tio, ĉiu germana esperantisto-laboristo, loĝanta en Plzeň, aliĝu al nia asocio. Ĉiujn demandojn oni adresu al: »Laborista Asocio Esperantista« en restoracio Macht, Plzeň, Skvrňanská 28, Ĉeĥoslovakio.

**Laŭ supre cititaj raportoj** oni povas diri, ke esperantista movado en okcidenta Bohemujo estas tre vigla. Ĉefe laboristaro konceptas, kiel necese kaj utile estas koni tiun ĉi praktikan lingvon, per kiu ili povas atingi sian celon.

**Pardubice.** Esperantista klubo »Dro. Schulhof« en Pardubice okazigis la 22. de februaro sian II. ĝeneralan kunvenon kaj resumis por pasinta unua jaro de agado ĵenan laboron: 3 publikaj kursoj por komencantoj, 2 publikaj kursoj por progres-

intoj. Enkonduko de Esp. en loka gimnazio kaj reallernejo, propra flugfolia propagando. Sukcesa rilato kun ministerio de poŝtoj kaj telegrafoj, pri allaso de Esp. dum XIII. kiel normale uzebila telegrafilingvo. Ekrilato kun loka Ruĝa Kruco. La 18. VIII. 1921 honorigo de mortotago de D-ro Schulhof; 15. XII. 1921 Zamenhova vespero. La 12. I. 1922 adiaŭa vespero kun kasisto de la klubo kaj del. de U. E. A. s-o V. Poppe, lin anstataŭas Inĝ. C. L. Daniel, Pardubice, Hronovická. — Nove elektita komitato: prez. Ing. L. Berger, vicprez. J. Doležal, I. sekr. A. Vamberová, II. sekr. M. Kroutilová, kas. (kaj del. de U. E. A.) Ing. C. L. Daniel, bibliotekistino R. Veverková, I. rev. R. Kopecký, II. rev. E. Kratochvilová, kaj 4 anstataŭantoj.

**Pardubice.** Post forveturo de s-o V. Poppe (del. de U. E. A.) funkcias kiel delegito s-o L. Daniel, inĝ. kand., Hronovická 640. Korespondadoj, kiuj rilatas C. A. E., U. E. A. akj esp. movadon, estu adresataj al li. Korespondadoj, kiuj rilatas klubon, oni adresu al s-o J. Doležal, Poštovní ředitelství, Pardubice.

**Bardiov** (Slovakio). Responde al peto de loka ŝtata poliestro, s-ro inspektoro Zdvoráček, faris paroladon pri esperanto la loka delegito D-ro Austerlitz. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 personoj. La nomita poliestro tre fervora al nia movado, ne nur mem lernas nian lingvon, sed ankaŭ per cirkulero alvokis preskaŭ ĉiujn societojn, klubojn kaj grupojn de nia urbo, por ke ili laŭeble are partoprenu la komencotan kurson. Ankaŭ la urba polickapitano afable subtenas niajn klopodojn. La ĉi tiea poŝtestro tuj aliĝis, rimarkante, ke la ĉeĥoslovaka registaro instigis ĉiujn poŝtovicistojn, ellerni la lingvon esperanto.

**Kladno.** Estis fondita nova klubo »Studenta esp. rondeto«. Elektita estis ĵena komitato: Kindl Gust., prezidanto, Grosman Fr., vicprezidanto, Císař Fr., sekretario, Buk Č., kasisto, Danda K., protokolisto, Aliaj anoj de komitato estas: Brožek K., Vyskočilová kaj Větrovcová. Oni gvidas kurson por 55 personoj. Instruas s-o Císař Fr.

**En Linz (Linec)** oni aranĝis la 25. kaj 26. de marto kongreson de aŭstriaĵaj esperantistoj. Bohemiaj esperantistoj en Aŭstrio estis reprezentitaj per s-oj: prof. d-ro Hugo Jokl kaj Max Ulmann el Vieno kaj Zidek Karel el Linec.

**Prostějov.** Esperantista klubo en Prostějov aranĝis ĝeneralan kunvenon la 13an de januaro. La fondinto kaj ĝisnuna prezidanto, kiu forlasis nian urbon, s-o Rudolf Fridrich, estis unuvoĉe elektita honora membro. La nuna komitato de la klubo estas: F-ino Marie Havránková, prezidantino, s-o Ant. Tyl, vicprezidanto, s-o Boh. Ošádal, sekretario, s-o F. Heikenwälder, bibliotekisto, f-ino Marie Dočkalová, kasistino, f-ino Švecová kaj s-o J. Vopálka, anstataŭantoj, f-ino Z. Loušťáková kaj s-o A. Hruban, revizoroj. — Regulaj kunvenoj okazas ĉiumarde je la 20a horo en restoracio de okcidenta (loka) stadidomo.

**La XIII. kaj Ellersiek.** Laŭ sciigo de s-o Pitlík, komitatano de la C. A. E., akceptis la komitato de ĉi nomita asocio la 3an de januaro 1922 ĵenan rezolucion: »La komitato de la Ĉeĥoslovaka Esperanto Asocio, la 3an de januaro 1922 konformiĝante kun la proklamo de la regionaj kunvenoj en Chrudim kaj Plzeň, rifuzas la neĝentilan, neveran kaj tendence redaktitan raporton de s-ro

Ellersiek, redaktoro de »Esp. Praktito«, pri la XIII. Universala kongreso en Praha, kiu tre similas malamajn atakojn kontraŭ la ĉeĥoslovaka respubliko kaj ĉeĥa loĝantaro de Praha, aperantaj en ŝovinistaj gazetoj politikaj. — Rimarko de redakcio: Per tio ĉi la redakcio finas la polemikon kun s-o Ellersiek.

oooo

## KORESPONDADO.

**Ĉeĥoslovakio.** Plzeň. Laborista Asocio Esperantista (germanlingva) deziras viglan interkorespondadon kun ĉiulandaj geesperatistoj. Oni interŝanĝas: esp. gazetojn, poŝtmarkojn, poŝtkartojn ilustr., div. broŝurojn, paperon monon kaj simile. Adreso: »Laborista Asocio Esperantista« (germana) Plzeň, restoracio Macht, Škvřňanská 28, Ĉeĥoslovakio.

oooo

## EL REDAKCIO.

**S-ro L. R. en P.** Dankon, sed vidu paĝon 85an en Fundamenta Krestomatio (sepa eldono). — Sendu finon de proverboj!

**F-ino B. M. en P.** Pardonu prokraston. Ni kore dankas.

**F-ino A. Z. en D.** Ion similan sendu pli ofte! Dankon.

## ESPERANTOGRUPOJ ATENTU!

Kiu volas malkare aĉeti esperantajn insignojn, manubutonajn, kravatpinglojn, diversajn belegajn esperantajojn, tiu sendu senprokraste Kč 82.— por tuj ricevi specimenaron — al samideano

**H. Röhlich, delegito de U. E. A.,**  
Jablonec n. N., Wassergasse 7a.

## ESPERANTAJN SIGELMARKOJN.

insignojn, poŝtkartojn kaj kaŭĉukajn stampilojn liveras

**Josefo Kocourek, gravuristo,**

Vieno, X., Arthaber-Platz 3.—14. (Aŭstrio).

Postulu specimenaron de esper. sigelmarmarkoj kontraŭ 1 Kč. 100 diversajn sigelmarmarkojn mi liveras po 5 Kč afrankite.

Kolekto de »La Esperantisto«. N-ro 1.

## ZAMENHOFA KURSO DE ESPERANTO POR ĈEĤOJ

ENHAVO:

Antaŭparolo de D-ro L. L. Zamenhof. Gramatiko. Fundamenta ekzercaro kun ĉeĥa traduko. Esperanta-ĉeĥa radikvortaro. Legaĵoj. Anoncoj.

32 dukolone presitaj paĝoj, gazeta formato (30×21 cm), eldono 20.000 ekzempleroj.

Prezo Kč 1.—.

Ĉefdeponejo: **R. Čech, vicdel. de U. E. A.,**  
Wien IX., D' Orsaygasse 7/23.

## Knihy, jež možno obdržeti u našeho administrátora F. Kavana:

pouze proti placení předem, na zaslanou složenku; po objednávece s připočtením porta; jiných knih nevedeme.

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český,**  
vázaný . . . . . Kč 7.50  
Slovník esperantsko-český, brož. . . . . Kč 5.—  
Časopis »La Progreso«, roč. 1918 . . . . . Kč 4.50  
Časopis »La Progreso«, roč. 1919  
Nroj. 5—10 . . . . . Kč 4.—  
Časopis »La Progreso«, roč. 1920 . . . . . Kč 16.—  
Časopis »La Progreso«, roč. 1921 . . . . . Kč 20.—  
**Tittl: Krátká mluvnice Esp.** . . . . . Kč 0.30  
**Horák: »Nur antaŭen!«, marŝo.** 10 ekz. . . . . Kč 5.—  
**Čejka-Krumpholtz: Malá mluvnice Esperanta** . . . . . Kč 3.10  
**Šupichová: Esperanto. Slovník a mluvnice,** doporučena ministerstvem vyučování pro kursy a samouky. . . . . Kč 8.80  
**Novák: Čeŝa literaturo.** . . . . . Kč 8.—  
**Dr. Absolon: Moravia Karsto.** . . . . . Kč 7.50  
**Esp. movado en Moravio** . . . . . Kč 4.—  
**Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár.** . . . . . Kč 0.80  
**Jazyk všeslovanský a Esp.** . . . . . Kč 0.20  
»O dvojí pravdě« . . . . . Kč 14.—  
por niaj abonantoj . . . . . Kč 12.—  
Vortoj de Zamenhof . . . . . Kč 6.—  
Sherlock Holmes . . . . . Kč 4.50  
**Božena Němcová: »Babička«,** fino de traduko »Avineto« . . . . . Kč 2.50  
Časopis Čes. Esp.-istů, r.: 1907—13 po . . . . . Kč 5.—  
Gvidlibro tra Praha . . . . . Kč 3.60  
**Výtah z Kotzina: Na obranu esper.** . . . . . Kč 2.40  
Co je esperanto . . . . . Kč —.20  
Zamenhofa kurso de esperanto por Ĉeĥoj, 100 kusů . . . . . Kč 100.—  
**Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo** . . . . . Kč 20.—  
**E. Privat: Vivo de Zamenhof** . . . . . Kč 48.—  
Por kongresaj glumarkoj . . . . . 100 Kč 10.—  
Esp. insignoj »U. E. A.« . . . . . Kč 8.—  
Esp. insignoj malgrandaj pingloj . . . . . Kč 4.—  
Esp. insignoj, esp. broĉoj . . . . . Kč 5.—  
**La Espero. Himno Esperantista. Poezio** de Zamenhof, muziko de Měníl, por fortepiano . . . . . Kč 4.—

## Via horloĝo funkcios precize

se vi ĝin donos por reboniĝi al

**FR. NOVÁK,**  
horloĝisto en Praha I.  
Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj, kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kč 4.—, afrankite Kč 5.—, 1000 pec. Kč 35.—, afrankite Kč 37.50.



Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: In. Gross, Plzeň, Houškova ul. 32. Presis laborista presejo, Plzeň.